

Teo Jung kaj liaj memoraĵoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 453, 1981.02.12 & 14

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Esperanto multon ŝuldas al homoj laboremaj, modestaj en siaj vivpretendoj, optimismaj koncerne al la estonteco de la zamenhofa lingvo. Unu el tiuj homoj estas Teo Jung, la fondinto de la gazeto **Heroldo de Esperanto**. Kun multe da intereso ni ĵus legis la aŭtobiografian libron **Ĉiu - Ĉiun**, en kiu Teo Jung senpretende, sed kelkfoje kun humuro, rakontas pri sia komplete al Esperanto dediĉita vivo.

A.- "Kia estis tiu vivo? Ĉu valoris ĝin vivi?" sin demandas la 86-jara aŭtoro. Kaj li tuj respondas: "Mi esperas, ke jes: ja dum mia tuta ĝisnuna ekzistado surtera mi estis optimisto. Neniam, eĉ ne en la plej malagrablaj kaj plej krizaj momentoj de tiu ekzistado perdiĝis mia espero je pliboniĝo."... "En 1936, kiam la Gestapo, tio estas la sekreta Hitlera polico, likvidis mian Esperantan presejon kaj eldonejon en Kolonjo, min - malgraŭ mia profunda disreviĝo pro la perdo de pene kun la helpo de sindonaj kunlaborantoj sukcesigita entrepreno - ekregis eĉ sento de liberiĝo: pli ol trijara laborado sub tia reĝimo nazia pli estis konstanta inkubo ol plezuro." (p. 8-9)

Cl.- Pri la ekstarigo de tiu Esperanta presejo, pri ĝiaj sukcesoj, ĝiaj krizoj, en tiu libro titolita **Ĉiu Ĉiun** Teo Jung tute simple rakontas. Lin legante, oni havas la impreson sidi apud avo, kiu rakontas pri sia infaneco, pri siaj aventuroj, pri siaj provoj, pri siaj ideoj, kun iom da fiero, sed tamen konsciante ke ĉio tio ne havas multe da graveco. Li rakontas sin, antaŭvidante ke nur la samcelanoj interesigos pri liaj memoraĵoj. kiuj fakte reprezentas "sep jardekojn en la Esperanto-movado". Ni citu lin:

A.- "Tamen, kelkaj epizodoj el tiu vivokuro kaj kelkaj el miaj pensoj kaj ideoj eble povas interesi aron da aliaj personoj, kiuj elektis por sia strebado la saman objekton, se ne kiel ĉefan vivocelon sed certe kiel unu el siaj preferataj idealoj aŭ flank-okupoj." (p. 7)

Cl.- Teo Jung en la verkado de siaj memoraĵoj helpis sin de kelkaj notlibroj, kiujn li plenigis en la jaroj 1909 ĝis 1919. Poste li ne plu faris regulajn notojn, opiniante ke, de tiam, la datoj kaj spertoj de lia vivo kaj granda parto de liaj pensoj kaj ideoj, estos troveblaj sur la paĝoj de la semajna gazeto "Heroldo de Esperanto", kiu fakte naskiĝis en aprilo 1920 sub la titolo "Esperanto Triumfonta".

A.- Se vi deziras intimiĝi kun la personeco de la kuraĝulo, kiu kapablis de 1920 ĝis la naziaj persekutoj eldonadi semajnan Esperanto-gazeton, kaj kiu rekomencis sian laboregon tuj kiam la cirkonstancoj tion ebligis, tiam la kvarcentpaĝa **Ĉiu - Ĉiun** de Teo Jung tutcerte faros de vi ne nur amikon, sed ankaŭ admiranton de tiu ĵurnalisto kaj samideano. Kontraŭe, se la historio de unu el niaj ĉefaj gazetoj ne interesas vin, tiu ĉi libro senpretenda, kelkfoje iom rapide verkita, ne ĉiam objektiva, restos por vi tedaĵo. **Ĉiu - Ĉiun** estss unu el tiuj libroj, kiuj estas atestantoj de jam forgesita mondo, tiu de la ekdisvolviĝo de la Esperanto-movado. Ĝi helpas nin kompreni en kiaj cirkonstancoj spiritaj, sociaj, ekonomiaj kaj politikaj bataladis niaj antaŭuloj.

Cl.- Teo Jung konsideras, ke epizodo en lia gimnazia vivo influis lian postan vivon, decidigante lin batali por la paco, prefere ol por la milito. Ni citu lin:

A.- "Ĵus estis finita la religia leciono, kie ni lernis, ke "ni devas ami nian proksimulon kiel nin mem, eĉ la malamikojn", kaj sekvis leciono de juna instruisto pri historio. Li rakontis interalie pri la franca-germana milito de 1870-71, kaj precipe pri unu sanga batalo, kiu finiĝis per la venko de germana taĉmento. Sed kiam li laŭvorte fanfaronis, ke

Cl.- "tie ni batis la francojn en ilian "Fresse"

A.- "mi forte indignis: tempe de la aludita milito la juna ŝovinista instruisto eĉ ne estis jam naskita! Sed pleje mi indignis pro la malestimega esprimo "Fresse"

Cl.- (= manĝega aparataĉo, buŝaĉo, vizaĝaĉo),

A.- kaj en mia knaba brusto, daŭrigas Teo Jung, mi sentis fortan inklinon bati la instruiston en lian "vizaĝaĉon". De tiam mi ankaŭ sentis, ke milito estas io abomeninda, la plej abomeninda kio ekzistas en la homa mondo, kaj en mia interno mi decidis batali prefere por la paco, kiom miaj estontaj kapabloj permesos."

Cl.- La tuta vivo de Teo Jung kaj tiu de lia gazeto "Heroldo de Esperanto" estas batalo por la paco, kiun ne kapablos venki la militfortoj.

A.- Estas en 1909, kiam li estis deksep-jara, ke Teo Jung eklegis pri Esperanto, sed la unua kontakto kun la lingvo ne estis tre entuziasmiga. Ni citu lin:

Cl.- "En decembro mi legis en faka revuo por presejoj, ke kontraŭ sendo de poŝtmarkoj je valoro de 15 pfeningoj oni ricevos instrulibron pri Esperanto, mi ĝin mendis. La "instrulibro" alvenis kvazaŭ donaco unu tagon antaŭ mia 17-a naskiĝa datreveno. Je mia bedaŭro ĝi estis nur broŝureto, ege primitiva, malbonpapera kaj presita per gotikaj literoj, fakte netaŭga kaj per si mem pli repuŝa ol konvinka. Provizore mi do ree lasis flanke la "mondolingvon", sed ne por longe."

A.- Teo Jung, unu jaron poste, povis mendi pli taŭgan lernolibron de Esperanto, kaj dum la monotona laboro en la presejo de sia patro, li parkeradis pli ol mil kvarcent vortojn. Ni ree citu lin:

Cl.- "Por ekzerci mian cerbon, mi komencis "forĝi rimojn", alivorte: mi ekrimis (ekkrimis?): dum la presado mi elpensis kelkajn versojn, poste lasis la maŝinon dum kelke da sekundoj plu moviĝi ne presante, kaj dume rapide notis la versojn sur folio da papero. Tiel estiĝis en kelkaj monatoj centoj da "poemoj", unu pli naiva kaj pli nematura ol alia... Simile mi agis, parkere lernante la kompletan enhavon de konversacia libreto de la itala lingvo, kaj same mi agis ankaŭ, kiam en septembro 1910 mi ricevis, post mendo, Esperantan lernolibron, de iu D-ro F. Stephan en Leipzig, kvankam ne tre taŭgan, kaj vortaron. En la daŭro de du semajnoj mi sukcesis, apud la maŝino, enmemorigi rondcifere 1400 vortojn; de tempo al tempo mi malfunkciigis por momentoj la prespovon de la maŝino, rapide rigardante en la vortaron okulkaptis nombron da vortoj kaj poste, denove igante la maŝinon funkcii normale, ilin enmemorigis."

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diris kelkajn vortojn pri la libro **Ĉiu-Ĉiun** de Teo Jung. Ĝis reaŭdo!